

& Laŭ la cirkonstancoj:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 184 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Morta princino kaj sep herooj.>

(#Melodio:

<1,6:23> (/so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;

(#Rekantaĵe: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Karlo Blaŭ kaj Petro Proke ; Sin malamis reciproke.

(×: **La spegulo veron diras ; Lin ĵaluzan ĝi inspiras ; La spegulo veron diras.**)

'2 Unu la alian mokas, ; Lin insultas kaj provokas.

'3 Dum koncerto enĝardena ; Estis ne plu seĝ' konvena.

'4 Proke apud Blaŭ eksidis, ; Sed li daŭre flanken vidis.

'5 Kaj dum ili do malbenis, ; Muzikisto jen alvenis

'6 Kaj prezentis la teleron, ; Ĉar deziris li moneron

'7 Blaŭ traserĉis ĉiujn poŝojn; Fine donis li dek groŝojn.

'8 Proke diris kun rifuzo: ; "Mi ja estas lia kuzo!")